



Esperanto

en Danio

15-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2008



**100 jaroj de
Dana Esperanto-Asocio**

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

IŭN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Ole Terkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40 eed@esperanto.dk

Presado: Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.08.2008

Enhavo

La jarkunveno de DEA.....	3
Prelega tago.....	5
Salutoj al DEA.....	7
Al la amikoj de DEA.....	10
La Ĝenerala kunveno de DEA 2008.....	17
Ekspozicio "Esperanto en Danio".....	19
Kultura Esperanto-Festivalo....	22
Esperanto-kurso.....	23
EU-subvencio al EEU.....	26
Sukcesa simpozio en Ĝenevo .	26

La jarkunveno de DEA

DEA centjariĝis! Sukcesplenan feston ĝuis pli ol 70 gastoj dum la preĝtaga ferio. Estis aranĝita solena kaj eventoplena programo.

La 100-jara datreveno de Dana Esperanto-Asocio estis celebrata inter la 18-a kaj la 20-a de aprilo en la kulturdomo en Dortheasvej, Kopenhago kun pli ol 70 gastoj el Danio, Finlando, Francio, Germanio, Italio, Litovio, Norvegio, Portugalio kaj Svedio. Efektive la *Centra Dana Esperantista Ligo* (la nomo de DEA ĝis 1972) estis fondita jam la 6-an de februaro 1908, sed ni preferis kunigi la jubilean festadon kun la tradicia jarkunveno en aprilo.

En sia bonveniga paroladeto



Ileana Schrøder, prezidantino de DEA, atentigis pri la prihistoria ekspozicio daŭranta jam kelkajn tagojn antaŭ la jarkunveno kaj aparte menciis la pionirojn Marie Schrøder (ne parenco!), Frederik Skeel-Giörling kaj Margrethe Noll, kaj la postajn aktivulojn Poul Thorsen, Paul Neergaard, L. Friis kaj ges-rojn Zacho.

Post la inaŭguraj vortoj estis jubilea tosto, kaj Ileana Schrøder transdonis al Stanislaw Mielczarek la taskon de vortgvidanto. Li gvidis nin tra aro da oficialaj salutoj (vidu pri tio apartan artikolon) kaj prezentis la festparoladon de la honora gasto, prezidanto de la Itala Esperanto-Asocio Renato Corsetti.

Corsetti en sia parolado komparis la tiaman kaj la nuntempan etosojn en la Esperanta movado. Li emfazis la protektan rolon de Esperanto en mondo, en kiu ĉiuj lingvoj kaj kulturoj estas malgrandaj sed samtempe samvaloraj.

Li opiniis ke ne estas kaŭzo de pesimismo ĉar Esperanto nuntempe kreskas malpli videble pro la reta interkomunikiĝo. La nuntempularo lernas kaj praktikas Esperanton pere de sia komputilo. Esperanto similas al la malbela anasido en la fabelo de H.C. Andersen – iam la homaro agnoskos la belegan cignon.

Tiam estis tempo por distraĵoj. Unue Wendy Meng brile pianludis komponaĵojn de Ĉajkovskij kaj Haydn. Post tiu ĉi trankvila kontribuo DEJO treege amuze distris nin per la satira teatraĵo ‘Estis – Estas – Estos’. La lasta distraĵo estis la kantado de grupo de kvar (neesperantistaj) profesiaj kantistoj, kiuj Esperante kantis kvar danajn kantojn. Fine ĉiuj partoprenantoj kantis la himnon de Eŭropo kaj la Esperon.

La posttagmezo finiĝis per la oficiala malfermo de la ekspozicio pri la unua jarcento de la dana Esperanto movado. Tiu ĉi estis la rezulto de la grandega laboro de Mogens Rude Andersen kaj liaj kunlaborantoj Bent Jensenius kaj Torben Svendsen.



La vendredo finiĝis per bankedo, sekvata de koncerto kun JoMo, konata Esperanto-trobadoro el Tuluzo, suda Francio. Li senpene saltis inter granda nombro da lingvoj kaj malsamdevenaj melodioj, sprite kunligante ilin per Esperanto. Iom poste aliĝis al li Kim Henriksen kun akordiono, kaj kune ili distris kaj dancigis la gastojn.

Dum la sabato estis nia “kleriga tago” kun prelegoj (vidu pli detale en sekva artikolo). Post la prelegoj alvenis buso por transporti la distriĝemiĝintan aŭskultintaron al la manĝejoj kaj amuzejoj de Tivoli. Dimanĉe Eugeniusz Rybarczyk ĉiĉeronis la eksterlandajn gastojn en la urbo, dum okazis la ĝeneralaj kunvenoj de DEA kaj de DEJO.

Prelega tago

La jarkunveno sabate enhavis streĉan programon kun ses prelegoj. Kvar eksterlandaj kaj unu enlanda eminentuloj prilumis la historion kaj aktualajn problemojn de nia movado.



La serion de prelegoj malfermis Detlev Blanke, kiu parolis pri lingvopolitiko por Esperanto. Esperantistoj opinias ke Esperanto estas lingvilo, kontaktilo, distriilo, mondsavilo kaj studobjekto. La neesperantistaro ne interesiĝas pri tiaj nebulecaj kapricoj. Precipe la neesperantistaj povuloj akceptus ĝian utilecon, se oni nepre konvinkus ilin pri ĝiaj perspektivoj kiel faklingvo. Laŭ la opinio de Detlev Blanke, se Esperanto ne taŭgas kiel faklingvo, ĝi ne taŭgas por prizorgi la ekonomiajn kaj politikajn interesojn de la povularo. Ĝis nun Esperanto ne estas sufiĉe stabila aŭ evoluinta kiel faka lingvo. Bedaŭrinde interalie la eldonita fakliteraturo pri esperantologio estas ofte la eldonaĵoj de neesperantistoj. Alia problemo estas, ke esperantistoj mem ne emas konsentiĝi; ekzemple kio estas la nomo de nia lando? Ridinde estas, ke ni ne tute certas, ĉu ni loĝas en Danlando, Danio aŭ Danujo. Detlev Blanke emfazis la gravecon, ke la movado ne tro frue malpacienca postuli sian akcepton kiel oficialan lingvon en Eŭropo. Pli gravas ke ni zorgu evoluigi la lingvon.


Kiel dua preleganto Anna Löwenstein prelegis pri Esperanto kiel familia lingvo. Pro siaj propraj spertoj kiel patrino kaj ankaŭ pro sia profesia scio ŝi tre interese informis la plejparte aĝan ĉeestantaron. Unue antaŭ multaj jaroj ŝi inspiriĝis pri la sukcesa plurlingva edukado, kian oni praktikis ĉe la familio Kehlet. Kiam Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti



gepatriĝis, ili decidis ke Anna parolu nur angle kaj Renato nur Esperante kun la infanoj. La infanoj glate lernis la italan ekster la hejmo en la lernejo kaj ĉe la parencoj ktp. Anna priskribis plurajn strategiojn, kiujn gepatroj povas elekti por plurlingve eduki siajn infanojn:

Unu homo – unu lingvo; t.e.la metodo elektita de la familio Corsetti. La situacia metodo; kiu estas, ke hejme ĉiuj parolas la saman lingvon kaj ekstere oni parolas ekzemple la landan lingvon. Kelkaj familioj elektas salti de la unua lingvo al la alia.

Por ke la gepatroj sukcesu tiel eduki la infanojn, la plej grava afero estas konformeco. La plurlingva edukado ĉe la familio Corsetti estis sukcesa: la du filoj tute regas la anglan kaj la italan. Ili bone Esperante parolas, kvankam ili kelkfoje skribe eraras. Fine Anna konfesis, ke de tempo al tempo ili pekas je la akuzativo!



Post la tagmanĝo okazis kvar prelegoj. Unue Mogens Rude Andersen vigle kaj detale rakontis pri la dramoplenaj tagoj en la jaro 1954. Tiam kunvenis la 4-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, kaj post granda postkulisa konflikto la konferenco adoptis rezolucion dediĉitan al Esperanto.

Wera Blanke tiam kontribuis per klara kaj utilega prelego pri ‘Publike Paroli’, disdonigante la praktikajn konsilojn en formo de libreto. Unue oni pripensu la temon de sia interveno. Ekstarinte oni koncize, malrapide kaj laŭte parolu pri la temo, ne forgesante la tempo-limon. Oni devas elekti stilon kompreneblan al la aktuala aŭskultantaro. Samtempe oni konsciu pri la sinteno de la aŭskultantaro adaptante la planitan kontribuon al la fluo de la diskuto. Wera Blanke substrekis la gravecon paroli starante; la preleganto devas esti



videbla ĉar tio subtenas la aŭskultadon. Oni ankaŭ havas pli liberan/fortan voĉon ol sidante, kaj la kapoj ĉirkaŭe ne ĝenos la son-ondojn el onia buŝo. Memorenda estas ankaŭ la ekstera (fizika) aspekto de la preleganto: ‘maldecas bankostumo en solenaĵo, same kiel kravato en somera tendaro – ĉe dubo: prefere formala.’ Ĉu oni parolu libere kun notoj (preferinde) dependas je la rego de la temo kaj la lingvo. Se oni elektas prezenti manuskripton, malkonsilinde estas simple tralegas ĝin. Oni nepre antaŭe bone ‘tralaboru’ ĝin. Respektplene estas memori la tempon, ĉar la aŭskultantoj rajtas havi la eblecon pridemandi kaj diskuti la temon.

Post la kafopaŭzo Renato Corsetti prelegis pri ‘La malbona lingvo aŭ la eŭropa dialekto de Esperanto’. Lia tezo estis ke Esperanto malpli-boniĝas pro la adoptado de ĉiam pli da vortoj, sed en la diskuto post la prelego Detlev Blanke argumentis por tute kontraŭa vidpunkto.

Konklude Anna Löwenstein parolis pri la vivo en Italio antaŭ du mil jaroj. Kvankam ĝi estis malpli streĉa ol la antaŭaj prelegoj dum la tago, ĝi estis sufiĉe informoplena.

Salutoj al DEA

Post la inauguraj vortoj Ileana Schrøder transdonis al Stanislaw Mielczarek la taskon kiel vortgvidanto, kaj la aro de oficialaj salutoj komenciĝis. Jørgen Christian Nielsen salutis kiel reprezentanto de Modersmål-Selskabet (la dana asocio de gepatra lingvo) kaj Flemming Thøgersen kiel estrarano de la dana UN-Asocio. Ambaŭ enfazis la fruktodonan kunlaboron kiun la asocioj havis kun DEA okaze de la Tago de gepatra Lingvo kaj promesis daŭrigi estonte tiun kunlaboron.

Sekvis salutoj de Sveda Esperanto Federacio, de la Klubo de Malmø, de Esperanto-Asocio de Finnlando, de DEFA, KEK kaj la klubo de Århus. Alvenis poŝtaj gratuloj ankaŭ de Zofia Barnet-Fornalowa (vidu apartan artikolon), de Esperanto-Societo de Gotenburgo kaj de

Esperanto Nederlando.

Aparte menciinda estas la saluto de la prezidanto de EEU, la irlandia diplomato Séan Ó Riain:

Nome de Eŭropa Esperanto Unio, mi elkore gratulas la Danan Esperanto-Asocion okaze de ties 100-jariĝo. Jarcento estas longa tempo, kaj pro via laboro Esperanto jam fariĝis parto de la historio de Danio. Komence de via dua jarcento, la afero de lingva justeco bezonas la danajn samideanojn pli ol iam ajn. Pro la geografia situacio de Danio kaj la simileco de la dana al la angla lingvo, vi havas aparte malfacilan taskon en viaj klopodoj malfermi la okulojn de la dana socio al la grandega maljusteco de la nuna sistemo de internacia komunikado. Dum ĉi tiu jaro, la Eŭropa jaro de Interkultura Dialogo kaj la internacia lingvojarco de la Unuiĝintaj



Nacioj, ni refortigu niajn penadojn atingi lingvan justecon kadre de plurlingva Eŭropo.

Pluraj faris al si la klopodon gratuli nin poeme. Jen la prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando, Tuomo Gundström:

*Antaŭ jarcent' en Kopenhago
Flirtis la verdstela flago
Ĉe l'unua sesio
Por la internacio
Al progreso de l'onta tago.
Aliĝis malgranda Danlando
Al la komuna Esperanto,
La kultura unio
Interhoma, kaj tio
Restas idealoportanto.*

*Estu Esperantujo Dana
Prosperejo samideana.
Daure bone ĝi fartu!
Novprojektojn ekstartu
L'Asocio kaj Ileana.*

La jenan sendis Boriŝa Miliĉević, direktoro de Esperanto-Instituto de Serbia Esperanto-Ligo:

AL NOVAJ VENKOJ

*Jam cent dudek pasis jaroj
de l' naskiĝo Esperanta,
malaperis tiomaj baroj
en E-mondo batalanta.*

*Nun la Majstro-monumentoj
memorigas famajn datojn
kiam liaj fortaj sentoj
kontraŭlingvaj venkis fatojn.*

*Kion Majstro ekkomencis
mond' pacema daŭrigis, -
per tio ĝi rekompencis
verkon kiun li estigis.*

*Kara frato el Brazilo,
el Pollando, el Danio,
nin kunligas komprenilo -
lingvo de Esperantio.*

*Nun parolas milionoj
la Lingvon Internacian,
UN-on pelas fortaj sonoj
fari paŝon historian:*

*En tutmondajn ja rilatojn
enkonduki Lingvon nian,
kaj popolaj lingvoj-fratoj
servu rondojn ĉiunaciajn!*

Salutoj venis ankaŭ post la jarkunveno. Jen fragmento el letero sendita al la prezidantino de DEA:

Sulmona (Italio) la 3-an de majo

Mi ekskribas havante ankoraŭ antaŭ la okuloj la bildojn de la freŝa vojaĝo en Danio: hela domo, verda herbejo, triumfo de jonkviloj en Tivoli, marakvo en kiu spegliĝas buntaj domoj kaj reĝaj kasteloj.....la marvirineto de Andersen.

Mi estas tre feliĉa pro la multaj fotoj, ĉar ili helpas min revidi la riĉan sperton de la Esperanta centjariĝo en Kopenhago. Ĝi regalas al mi okazon koni aliajn samideanojn en ĉefurbo aparte ekstraordinara.

Mi dankas vin pro la afableco kaj ĝis revido (en Roterdamo).

Plej kore

Franca kaj Pino

Al la amikoj de DEA

*La jenan saluton sendis al ni la multjara pola amikino de Danio,
Zofia Barnet-Fornalowa:*

Karaj Gesamideanoj, mi plenkore dediĉe centoj da sindonaj samideanoj.

La pioniroj

Vi havas signifajn atingojn en disvastigado de Esperanto en Danio kaj pli vaste en la mondo. Laboris por tiuj atingoj plen-

Gratulante al vi okaze de via Jubileo, mi deziras honori la memoron, almenaŭ al kelkaj el ili, kiuj pioniris organize, kaj tiuj kiuj

iniciatis diversajn aktivadojn, kiuj fruktis(as) en tio, ke la Esperantomovado en Danio estas alloga kaj demokrata, riĉa intelekto kaj kulture; akorda al la idearo kaj ĉefcelado de kreinto de Esperanto. Ankaŭ tre gravas, ke en Danio, Esperanto estis kaj daŭre estas rekonata de ŝtataj kaj lokaj instancoj, ofte ankaŭ subtenata kaj apogata de ili diversmaniere.

Unuavice nepras memori kaj honori f-inon Marie Schrøder. Laŭ ŝia instigo, en 1907, en Kopenhago fondiĝis Konversacia Esperanto Klubo, kaj en 1908, do antaŭ 100 jaroj la Centra Dana Esperantista Ligo. Post CDEL en Kopenhago, aperis pluraj sekvaj grupoj en aliaj lokoj de Danlando. Bedaŭrinde ŝi ne povis daŭrigi sian fruktodonan, plendediĉan agadon; pereinte pro akcidento survoje al la 5-a UK en 1909. Substrekindas, ke M. Schrøder estis tre aktiva en pluraj aliaj idealismaj movadoj: feminisma, pacifisma, vegetara kaj aliaj.

Noll

Nepras laŭvice danke memori alian talentan plurkampe, dum kelkaj jardekoj, aktivantan Espe-

rantan gvidantinon: f-inon Margrethe C. Noll. Ŝi ankaŭ apartenis al pioniroj de la Movado; aliĝinte al ĝi en 1907. M. Noll estas plenmerite konsiderata, dum longa sia aktivado, spirito kaj 'motoro' de la Movado en Danio. Ŝi harmonie kunlaboris kun diversaj tendencaj en la Movado, instruante, organizante prelegturneojn, helpante al samideanoj dum ambaŭ mondmilitoj, dividitaj inter militantaj blokoj, kaj al ties parencoj ligi kontaktojn. Spertion ankaŭ d-ro L.L. Zamenhof, klopodante ligi kontakton kun sia filino Sofio, troviĝanta dum la 1-a mondmilito en Ruslando. M. Noll apartenis ankaŭ al la plej engaĝitaj en kontraŭstaro al Ido, kiu dum kelka tempo sufiĉe grave malutilis al Esperanto. Ĝenerale dirite ŝia kontribuo por la dana Esperantomovado, kaj pli vaste, estas nesupertaksebla.

Intermilite

Ne eblas en gratul-letero ne menciigi eĉ parteton de aliaj idealistoj, kiuj same plendediĉe laboris diverskampe por Esperanto. Tial mi nur menciigu kelkajn: Svend Iversen, Tage Lau, Paul

Neergaard, Poul Thorsen. El inter tiuj pluraj, mi dediĉu almenaŭ kelkajn frazojn al du, kiujn oni devas konsideri kolonoj ne nur de la laborista Esperanto-movado en Danio. Temas pri Paul Neergaard kaj Poul Thorsen.

D-ro Paul Neergaard specialiĝis pri plantpatologio, ĝardenkultura zoologio kaj genetiko. Li verkis signifan studon pri esperantologio. Ĝi troviĝas en la verko 'Tra densa mallumo' kaj estis publikigita en la plej morna periodo de homaro; la Dua Mondmilito kaj Holokaŭsto, en 1942. La studo estas titolita: 'La Esperantologio kaj ties Disciplinoj, Taskoj kaj Rezultoj.' La libron kunaŭtoris Poul Thorsen. Videblas klare, ke la verkintoj de libro per ĝi celis konservi, progresigi la Esperantomovadon, registrante la ĝistiamajn atingojn de la Esperanto-kulturo.

Neergaard verkis ankaŭ fakvortarojn kaj plurajn studojn kaj artikolojn rilatantaj lingvistikon. Grava estas lia verko pri apliko de Esperanto en scienco. Pri lia engaĝiĝo al siatempa problemaro atestas interalie 'Scienco kaj Pseudoscienco pri Heredo kaj Rasoj', publikigita en 1937. Tiu-

tempe en kelkaj landoj evidentiĝis ondo de rasisme bazita naciismo. Tiukaŭze ĉi-verkon oni devas konsideri, kiel sciencaj intervenon kontraŭ tiu nociva fenomeno.

Postmilite

Dum kelka tempo Neergaard estis ĉefredaktoro de la revuoj 'Esperantologio' kaj 'Sciencaj Studoj'. Pluraj liaj popularsciencaj verkoj estis tradukitaj al naciaj lingvoj. Kiel menciite li estis kolono de la laborista E-movado. Li ĝuis altan rekonon en sia fako kaj gvidis konferencojn kaj seminariojn pri biologio kaj agronomio; temis pri lingvaj problemoj. Neergaard ankaŭ lektiis en la Internacia Somera Universitato de UEA.

Poul Thorsen estis eminenta poeto, la granda parto de poemoj troviĝanta en 'Dana Antologio' estis de li tradukita. Li estis bona organizanto, eldonisto de libroj. Estinte profesie instruisto, li multe da atento dediĉis al klerigado, en tio al flegado de heredaĵo: libroj, dokumentaro. Tiucele okupiĝis pri bibliografio. Li verkis studon pri esperantlingvaj tradukaĵoj el la

dana, publikigita en 1952. Lia komprenemo ĉi-rilate estas admirinda...

Al kulturado de intelekta kaj arta heredaĵo, servis ankaŭ establita de Kirsten Zacho kaj li, 'Eldonejo KOKO'. Ĝi eldonis valorajn, plurĝenrajn librojn; ĉefe beletrajn, inkluzive de Majorie Boulton, kaj de la eldonisto Poul Thorsen mem.

La eldonistoj fojfoje donacis al iuj bibliotekoj siajn eldonaĵojn opiniante, ke posedo de libroj estas grava faktoro de edukado kaj konsekvence progreso de la Movado, apud memkompreneble idealismo. Por edukado kaj flegado de la heredaĵo estis establita, en 1997, de li kaj lia edzino Roma, ankaŭ profesie instruistino kaj Esperanto-aktivulino, fonduso nomata 'Biblioteka Apogo de Roma kaj Poul Thorsen'. Ĝia celo estas liveri senpage valorajn librojn al kluboj, kaj asocioj, kiuj ne estas subvenciataj de ŝtato aŭ de lokaj instancoj, kaj kies ekonomia stato ne donas eblecon mem ekipi siajn bibliotekojn per valoraj libroj. Ambaŭ idealistoj – kleruloj, bonfarantoj ne plu vivas, sed ilia bonfaremo, vastanimeco

daŭre servas al la Movado; grave riĉigas ĝin.

Kleriga laboro

Por fini tiun parton de letero, per memorhonorigo, oni nepre devas mencii alian kleran kaj plendediĉan, inventeman Esperantan danan geedzan paron. Temas pri Kirsten kaj Peter Zacho. Ambaŭ, same kiel ges-roj Thorsen, profesiaj instruistoj, grave kontribuis al la Movado. Ili instruis Esperanton en diversgradaj kursoj, estis ĉeforganizantoj de internacie signifaj Esperanto-aranĝoj.

Inter ili estis, en Kopenhago, la impona solenaĵo okaze de Centa naskiĝdatreveno de la kreinto de Esperanto, en 1959. Ĝi trovis altan aprezon en Esperantorevuo, ankaŭ en 'Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro', 1960. Kirsten Zacho ankaŭ grave kontribuis en la establo de supre menciita 'Eldonejo KOKO'. Ŝi iniciatis kaj enkorpigis plurajn aliajn agadojn.

Kiel tre signifan oni devas konsideri fondon, en 1952, de ges-roj Zacho apogataj de P. Thorsen, H.V. Rasmussen, kaj kelkaj aliaj aktivuloj, de la fama en

Esperantio: ‘Komuna Konversacia Klubo’ (KKK), poste ŝanĝita je ‘Komuna Kleriga Klubo’. Ĝi kunfandiĝis poste kun la ‘Studenta Esperanto-Klubo’, kaj grupigis eminentajn intelektulojn, kaj laŭ organizaj kapabloj, aktivulojn. Inventemo kaj signifo de tiu klubo meritas esti vaste pritraktata, por tiri de ĝiaj iniciatoj kaj atingoj konkludojn por nuntempo kaj estonto.

Valoras ĉi-loke almenaŭ mencii, ke Kirsten Zacho estis ankaŭ rekonata internacie. Ŝi estis tre aktiva kiel Komitatano C de UEA. Dum kelka tempo ŝi redaktis revuon ‘Esperanto’. Post forpaso de prof. Ivo Lapenna, pluraj membroj de KKK fariĝis membroj de Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna kaj klopodis laŭeble, daŭre disvastigi kaj kulturadi restantan post li grandan intelektan kaj kulturan heredaĵon. De spirito kaj celado de KKK fontas zorgo pri ĝi.

Peter Zacho ĉiufanke apogis aktivadon de sia plendediĉa kaj inventema edzino. Li mem estis kunaŭtoro de kelkaj libroj en Esperanto kaj dana lingvo. Post damaĝaj eventoj en Hamburgo,

1974, rezulte de kiuj prof. I. Lapenna retiriĝis de aktivado de UEA, P. Zacho disponigis sian presejon kaj eldonejon ”Perspektivo” al la Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM), kiu tiam estis fondita kaj poste gvidata de prof. Ivo Lapenna.

La eldonejo “Perspektivo” eldonadis periodaĵon samtitolan, kies redaktoro estis P. Zacho, kaj duan revuon titolitan ”Horizonto”, kies ĉefredaktoro estis prof. Ivo Lapenna. Ĝi ankaŭ eldonis kelkajn broŝurojn, en kiuj oni klarigis la fonon de la damaĝaj eventoj el 1974 kaj la ĉi-rilate gravan libron ”Hamburgo en Perspektivo: Dokumentoj kaj Materialoj pri la Kontraŭneŭtraleca Politika Konspiro en Universala Esperanto-Asocio” en 1977.

Paca batalo

Peter Zacho aktive partoprenis en aktivado de NEM, grupiganta plurajn eminentajn esperantistojn. La aktivadon poresperantan de Kirsten kaj Peter Zacho daŭrigas, laŭ siaj eblecoj, ilia filino Birthe Zacho-Lapenna. Ŝi partoprenas kelkfoje UK-ojn kaj aliajn signifajn Esperanto-aranĝojn.

Rilatas per intervenoj en Esperanto-revuaro, kontraŭstarigante al provoj neadekvate prezenti eventojn, ligitaj kun aktivado de sia edzo – prof. Ivo Lapenna. Ŝi ankaŭ prelegas en kopenhagaj kluboj, kaj ne nur tie, prezentante aferojn, kiujn kelkiuj kontestas, aŭ rekte dirite, falsigas lian grandiozan kontribuon al la Movado. Ŝi aŭdigas ankaŭ prelegojn pri aliaj interesaj temoj.

Ĉefe tamen ŝi okupiĝas pri konservado kaj kulturado de heredaĵo de prof. Lapenna. Kaj tre gravan oni devas konsideri la eldonon de kolekto de kompaktaj diskoj, enhavantaj liajn eminentajn modelajn paroladojn.

Oni devas noti kiel grandan el la lastetempaj atingoj de Birthe Lapenna, la akcepton kaj efektivan transdonon al la Ŝtata Arkivo de Danio en Kopenhago, de la arkivo de prof. Ivo Lapenna. Ĝi konsistas el grava dokumentaro, rilatanta verkojn pri juro, en kiu li kiel sciencisto internacie eminentis. Ankaŭ dokumentaron pri esence gravaj problemoj de nia Movado. De ĝi, fakte ordigita povas nur profiti esplorantoj de Esperanto-historio. Pri signifo por

scienco jura kaj esperantologio de tiu arkivo, ne necesas konvinki. Tio estas evidenta.

Feminisma aspekto

Enprofundiĝante iom en la historion de la dana Esperantomovado, oni konstatas, ke al ĝia evoluo, progreso, aparte multe kontribuis virinoj. La afero tutcerte ne estas hazarda. Tio ligiĝas esence kun fakto, ke skandinaviaj landoj karakteriziĝas per demokratio. Tiukaŭze, tutcerte relative multe da virinoj aktivis kaj daŭre aktivis en diversaj idealismaj movadoj.

Nehazarde, ĝuste en Kopenhago, en la jaro 1910, okazis Internacia Konferenco de Socialistinoj. Dum oni prikonsideris la soci-politikan kaj ekonomian situacion de virinoj. Sekve estis prezentitaj prioritataj taskoj realigendaj por plibonigi staton de virinoj vastskale.

Por tio estis ankaŭ, laŭ iniciato de Klara Zetkin, decidite ke la 8-a de marto estu Internacia Tago de Virinoj. Ĝi estas solenata ekde 1913. Dum ĝi oni manifestas la celadon de virina movado, evidentiĝas solidarecon kun virinoj

en ĉiu mondparto. La ideo daŭre aktualas, kaj tial al la Esperantomovado ĝi ne estas indiferenta.

Menciindas, ke ĝuste en la Jubilea Jaro – 100-jariĝo de la Dana Esperanto-Asocio prezidas ĝin ankaŭ virino, Ileana Schrøder, kaj la ĉefmotoro de agado de la Fervojista Esperanto Klubo, en Kopenhago, estas de pluraj jaroj Lene Niemann.

Personaj salutoj

Por la fino mi deziras gratuli kaj saluti ĉiujn danajn gesamideojn. Aparte mi ŝatas saluti mian elkoran amikon, Mogens Groth, kiu pro sanstato ne povas nuntempe daŭrigi la aktivadon, sed kiu grave kontribuis al la Movado. Li aktivis en divers-tendencaj kluboj, interalie en la laborista, ĉie servante per sia klereco kaj varmkoreco.

Ĉi-loke mi menciuj almenaŭ nur lian grandan kontribuon al «Norda Prismo». Temas pri verkado, administrado kaj distribuado de tiu valorega daŭriganto de «Literatura Mondo». Lian altvaloran intelekto kaj socie aktivadon,

estus utile esplori kaj verki pri ĝi apartan prilaboron. Saluton kaj bonfarton kara Mogens!

Mi ankaŭ deziras elkore saluti Astrid Birckbak kaj Erik Mortensen. Ili estis la unuaj danaj esperantistoj, kiujn ni havis favoron kaj plezuron gastigi en nia hejmo en Raszyn. De tiu vizito komenciĝis nia amika kontakto kun la frateca Kopenhaga Fervojista Esperanto-Klubo.

Karaj Danaj Amikoj, de ĉiuj kluboj, mi esperas, ke la Jubileo de 100-jariĝo, de la dana Esperantomovado ne limiĝos al ĝenerala solenaĵo al kiu kontribuis ankaŭ la invititaj eksterlandaj eminentaj prelegantoj, kaj ke vi studos vian valoran heredaĵon dum la tuta Jubilea Jaro, por tiri de ĝi konkludojn por nuntempo kaj estonto.

Mi finas mian, nekutime longan gratul-leteron, fontantan de mia estimo kaj samideana amikeco per bondeziro: Sekvaj cent jarojn de fruktodona laboro por realigo de nia grava, **Homaranisma Afero**.

Jerzy, mia edzo, elkore aliĝas al la gratuloj kaj bondeziroj!

La Ĝenerala kunveno de DEA 2008

Protokolo de la Ĝenerala kunveno de DEA 2008, okazinta la 19-an de aprilo 2008 en Kulturhus Nordvest (Nordokcidenta Kulturdomo) en Kopenhago.

Ĉeestantoj de la estraro: Ileana Schrøder, Rasmus Høyrup Jensen, Ejnar Hjort, Jens S. Larsen, Ina Schultz, Bent Lensenius, Ana Røssum, Stanislaw Mielczarek.

1. Elekto de kunvena gvidanto

Stanislaw Mielczarek estis elektita kiel vortgvidanto (VG), kiu komence instigis al la partoprenantoj prizorgi ke estu frutodona kaj harmonia jarkunveno. Sekve li konstatis, ke la kunveno estis ĝustatempe alvokita.

2. Elekto de protokolanto

Dennis Priskorn estis elektita kiel protokolanto.

3. Jara raporto

Ileana Schrøder (prezidanto de DEA) laŭtlegis la plejparto de la jarraporto. Jen la ĉefpunktoj de la prezento:

- Partopreno en foiroj diversurbe
- Lingvofestivalo en la Gronlanda domo en Kopenhago.
- Kunlaboro kun NRO-oj
- Laboro pri nova dana-Esperanta vortaro
- Eldono de historia libreto en la fino de 2008
- Bedaŭro de la forpaso de la sperta esperantisto Svend Dragsted (sekvis memoriga paŭzeto)
- Prezento de Esperanto en arĥitektura aranĝo japanstila
- Intervjuo de Ileana en la nacia dana radio (P1) okaze de la 100-jarigo de KEK
- Kunlaboro kun la asocio por la dana lingvo (Modersmålsselskabet)

- Mencio de Esperanto en la gazetaro
- Eldonado de Esperanto Nyt fare de Ejnar Hjort.

Komentoj kaj demandoj: Jonas Dalmose informis ke li dum la dua parto de la jaro gvidis Esperantokurson en la universitato de Aarhus, kie li studas. Vagn Frausing demandis kie troveblas la malnova kaj peza E-ekspozicio. Kim Henriksen informis, ke ĝi nuntempe estas ĉe li. La jarraporto estis akceptita de la ĉeestantoj.

4. Jara kalkulaĵo

La kasisto de DEA Ina Schultz prezentis la jaran kalkulaĵon. DEA elspezis pli ol kutime, pro la 100-a jarkunveno kaj la lupago al la Kulturhuset Nordvest.

Ekestis diskuto pri la prezento de la en- kaj elspezoj rilate al la lupago al Kulturhuset Nordvest. En la diskuto intervenis: Ina Schultz, Kim Henriksen, Peter Weide, Jimmy S. Meyer, Eliza Kehlet, Ana Røssum, la VG kaj Vagn Frausing. Estis konstatite ke la lupago estas pli ol 20.000 kr. jare sed ke en 2007 la heredaĵmono de Poul Thorsen estis uzita por pagi la luon kaj ebligi stokado de la biblioteko de li, kaj DEA partoprenis per 6.000 kronoj.

Voĉdono: La jara kalkulaĵo estis akceptita kun rimarkaj konsiloj de Weide kaj Meyer. Unu ĉeestanto restis sindetena.

Rimarko: La jarkunveno taskas la kasiston estonte eksplicite montri ricevitajn financajn subtenojn, kiel enspezon.

5. Laborplano de DEA

Schrøder prezentis la laborplanon por 2008/2009. Schrøder konstatis, ke estas multe da laboro por malgranda kerno da aktivuloj en DEA. Kun ĝojo ŝi plue informis, ke la laboro dum la foiroj ne vanas, ekzemple ekestis kurso kun 15 studantoj de Esperanto en Odense post partopreno en foiro tie.

6. Envenintaj proponoj

Kim prezentas sian proponon pri dinamika retejo. Kelkaj komentaj

intervenoj poste estiĝis. Komentis: Meyer, la VG, Priskorn kaj I. Schrøder.

Voĉdono: La propono estis akceptita kun multaj sindetenoj.

7. Elekto de prezidanto

Voĉdono: Schrøder estis reelektita.

8. Elekto de estraranoj kaj anstataŭantoj

Voĉdono: Hjort kaj Bent Jensenius estis reelektitaj, krome estis elektitaj Ole Therkelsen kaj Arne Casper Mortensen. **Voĉdono:** Røssum kaj Mielczarek estis reelektitaj kiel anstataŭantoj.

9. Elekto de revizoroj kaj anstataŭanto

Voĉdono: Tara Gregers kaj Lars Kromann estis reelektitaj kiel revizoroj. Henriksen estis elektita kiel anstataŭanto.

10. Eventualaĵoj

Jarĉefkunveno 2009: Schrøder prezentis la urbon de la jarkunveno en 2009: Århus.

Rasmus Jensen rakontis pri la sukceso de DEJO inviti homojn labori ĉe Roskilde Festivalo en 2007. Laŭ Jensen DEJO gajnis sufiĉe da mono (19 mil kronojn) kaj je la fino de la festivalo tenis bonan reputacion ĉe ĝia estro en la Festivalestraro. La organizantoj de DEJO nuntempe planadas ĉeesti denove dum la somero 2008 kun ĉ. 30 kunlaborantoj.

Betty Chatterjee dankis al la partoprenantoj de la jarkunveno pro la bona etoso kaj al la estraro pro la fruktodona laboro por Esperanto. Schrøder dankis al la kasisto Schultz okaze de ŝia kvinjara laboro.

Ekspozicio "Esperanto en Danio"

Okaze de la 100-jara jubileo de DEA estis aranĝita bela ekspozicio, kie oni povis interalie trarigardi momentojn de nia movada historio. Jen la kompilinto Mogens Rude Andersen iom rakontas pri ĝi:

La “Unua Libro” eldonita de L.L. Zamenhof en 1887 estis 40-paĝa broŝuro kiu enhavis vortliston de pli ol 900 vortradikoj, per kiuj oni helpe de sufiksoj kaj prefiksoj povis fari minimume 10.000 vortojn. En la ekspozicio oni povas vidi ekzempleron. Apude kuŝas la Plena Ilustrita Vortaro de la jaro 1970, kun ĉ. 15.250 vortradikoj, per kiuj oni povas formi minimume 150.000 vortojn.

Jam en januaro 1890 estis eldonita la unua dana lernolibro de Christian Nielsen (1827-1896) en Flensburg, laŭ instigo de Zamenhof. Post la morto de la aŭtoro en junio 1896, lia familio bruligis la nevenditajn ekzemplerojn, pro kio la libro nun estas raraĵo. La Ŝtata Biblioteko en Århus donis tre afable al ni la eblecon prunti ekzempleron por la ekspozicio. En 1904 aperis de Skeel-Giörling vortaro kaj lernolibro, kiujn oni ankaŭ povas vidi, kaj de tiam aperis aro da danaj lernolibroj por infanoj, junularo kaj plenkreskuloj, (la lasta en marto 2008), ankaŭ reprezentitaj en la ekspozicio.

En la Dana Antologio de 1961, subvenciita de la dana Kleriga

Ministerio, estas prezentitaj 39 danaj verkistoj kaj verkoj de interalie H.C. Andersen, Piet Hein, Johs. V. Jensen kaj Hans Kirk. La monda literaturo reprezentigas en la ekspozici interalie per la Sankta Biblio, la Nobla Korano, Kalevala, La Dia Komedio de Dante, Hamleto de Shakespeare kaj Don Quijote de Cervantes. Multaj danaj kantoj ekzistas en Esperanta traduko kaj kelkaj videblas en la ekspozicio.

Ekde 1908 pli ol 800 danaj partoprenis en la dana Esperanto-ekzameno: 556 en la unua ŝtupo kaj 349 en la dua. Oni povas trarigardi statistikon pri ekzamenoj kaj ankaŭ specimenojn de skribaj taskoj de diversaj jaroj.

Okaze de la 50-jara jubileo de DEA en 1958, aro da konataj politikistoj kaj kleraj personoj instigis la danan loĝantaron aliĝi al la Esperanto-kursoj en la vesperlernejoj, interalie Jens Otto Krag, Erik Eriksen, Viggo Kampmann, Jørgen Jørgensen, Piet Hein, Gerda Gilboe kaj Jens Rosenkjær. Tiu skriba instigo estas ekspoziciero. Vidindaj estas ankaŭ la bildoj de tri danaj Universalaj Kongresoj de Esperanto

kaj aliaj internaciaj eventoj en la lando; kursoj en la Internacia Altlernejo de Helsingør kaj en la Jutlanda Sporta lernejo en Vejle.

La Feroaj insuloj kaj Gronlando ankaŭ estas reprezentitaj. En oktobro 1965 oni aranĝis gronlandan vespero en KKK/SEK. Granda parto de tiu materialo estis eldonita en speciala numero de Norda Prismo pri la gronlanda popolo. La Ministerio de Eksteraj Rilatoj interesiĝis pri la 40-paĝa abunde ilustrita numero kaj pagis por tri eldonoj, kiuj estis distribuitaj tra la mondo pere de la danaj ambasadejoj, kaj oni povas vidi ĝin en la ekspozicio.

Tra la jaroj multaj landoj eldonis Esperanto-poŝtmarkojn kaj aliajn filatelaĵojn. Homoj kolektas poŝtmarkojn pere de la lingvo. Esperantistoj havas ofte kore-

spondamikojn, kaj por ili estas nature informi pri la poŝtmarkoj – valora kontribuo de dana kulturo.

Dum la ĝenerala kunveno de Unesko en Montevideo en 1954 Esperanto estis agnoskita pro sia valora kontribuo en agadkampoj edukado, scienco kaj kulturo. Parto de ĉi tiu ekspozicio konsistas el ekspoziciaĵoj faritaj por prelego en la Kulturgrupo en 2004 okaze de la 50-jara jubileo de la Unesko-rezolucio.

Se vi ne havis la okazon vidi la ekspozicion en la Kultura domo en Kopenhago, vi anstataŭe povas vidi retan filmon pri ĝi. Aleksander Kogan tenis la kameraon dum la kompilinto rakontis; la rezulto estas videbla en la publika dosiero de Aleksander sub google.com.



Kultura Esperanto-Festivalo

Okaze de la 100 jara jubileo de DEA kaj KEK, la festivalo KEF denove okazos en Danio. Ĉi-foje estos en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsingør. La datoj estas la 12a ĝis la 19a de julio 2008.

Nun la 9an fojon junuloj en Nordio aranĝas la Kulturalan Esperanto-Festivalon. Ĝi estas festivalo kie ni prezentas altkvalitan originalan Esperanto-kulturon. Ĝenerale la unuaj tagoj de la festivalo estas pli metiejaj kaj la lastaj tagoj estas pli distraj. Meze estos ekskursita tago. La festivalo estas festivaleja en sia formo, tiusence ke oni loĝos primitive kaj tiamaniere la kostoj ne estas tiel altaj, kvankam Danio estas unu el la plej multekostaj landoj en la mondo. Kompreneble eblas ankaŭ loĝi en migrulhejmo aŭ en hotelo por aldona kosto.

Amaso da bonaj kaj konataj Esperanto-artistoj venos, ni menciui en hazarda ordo: Ĵomart kaj Natasha, Martin Wiese kaj la Talpoj, Sten Johansson, Hotel Desperado, Kaj Tiel Plu, La Perdita Generacio, Jorge Camacho, Initials dc, Zhou Mark, Supernova, Teatra Grupo de Tuluzo, Pafklik.



Vidu ĉe www.kef.saluton.dk pri pli da detaloj, la diversaj metiejaj kaj kotizoj. Eblas aliĝi al la tuta semajno, al unuopa tago kaj eĉ al unuopa koncerto.

Kim J. Henriksen



Bonvenon al la 23-a internacia somera

Esperanto-kurso

6-13 julio 2008 en Lesjöfors, Svedio

La kursoj komencis sian ekziston en la jaro 1986 en Popola altlernejo de Karlskoga. Pli poste oni translokigis ilin al nia propra Esperanto kursejo en Esperanto-Gården, Lesjöfors. Ĝi situas en arbara, lagoriĉa provinco Vermlando.

La instruado okazas nun en tri niveloj: komencantoj, progresantoj kaj parolantoj.

Krom tio ni havas infanan grupon. Ĝi donas bonegan eblecon al gepatroj aŭ geavoj pasigi unu semajnon kune kun sia juna generacio. Plenkreskuloj en la familio povas mem partorpeni la dumtagan lernadon aŭ esti kun siaj infanoj. Ekzistas riĉaj eblecoj por promenado,

biciklado, fiŝkaptado, legado ktp.

Ni antaŭvidas varian kulturalan programon, kiu okazas ĉiuvespere dum la kurso.

Adreso

Esperanto-Gården
Stiftelsevägen 1
SE – 680 96 Lesjöfors
Tel. 0046590-30909
Hejmpaĝo: [www.e-g
egarden @ esperanto.se](http://www.e-g
egarden@esperanto.se)

Prezoj

Plenkreskulo 2200 kr.
Infano ĝis 15 jaroj 1500 kr.
Studantoj 1950 kr.
Alpago por dulita ĉambro 700 kr
por persono
Alpago por unulita ĉambro 1100 kr

Ĉi-jara kurso

La kurso komenciĝas la 6-an de julio (de la vespermanĝo) kaj finiĝas per la tagmanĝo la 13-an de julio. Tiuj kiuj venos pli frue au forveturos pli malfrue povas antaŭmendi kaj aĉeti pli da manĝokazoj.

La premio okaze de frua aliĝo

Tiu kiu jam aliĝis la 10-an de junio 2008 ricevos lernolibron aŭ vortaron kiel premion.

Kiel atingi Lesjöfors?

Lesjöfors situas en okcidenta Svedio, 300 km okcidente de Stokholmo kaj 300 km norde de Gotenburgo. La plej proksima fervojstacio estas Kristinehamn. De Stokholmo kaj Gotenburgo vi povas uzi ankaŭ busojn, kiuj venas al Kristinehamn aŭ Filipstad. De tie prenu la buson 402 kiu iros al Lesjöfors. La bushaltejo en Lesjöfors nomiĝas Stiftelsevägen. Serĉu pli da informo en la reto aŭ demandu nin, se vi bezonas helpon.

La plej proksima internacia flughaveno estas en Karlstad. De tie uzu la buson.

Per aŭto: Sekvu vojon RV 26 de Filipstad ĝis Lesjöfors kaj poste sekvu

montrilojn por manĝvendejo ICA. Esperanto-Gården situas ĝuste kontraŭ la ICA-vendejo.

Junulargastejo

Esperanto-Garden estas samtempe junulargastejo. Ni ne havas iujn dungitajn servistojn, la tuta laboro estas senpaga. Tio signifas ke ĉiu prizorgas mem la litaĵojn kaj mem purigas sian ĉambbron en la fino de la semajno. Sed estas ebleco prunti littukojn kontraŭ 60 kronoj.

Ekskursoj kaj libroj

Prezoj por la ekskursoj kaj libroj ne inkluziviĝas en la pago por la kurso.

Pago

Eblas pagi al la poŝtĝiro-konto 989065-8.

Oni povas uzi UEA-konton LESJ-Q (kun aldona kopio de la ĝirilo al Esperanto-Gården). Bankkonto 9960 260989 0658

IBAN: SE37 9500 0099 6026 0989 0658

BIC-kodo (SWIFT-adr): NDEASESS

Eksterlandanoj rajtas pagi surloke.

Aliĝilo

Nomo.....

Naskiĝjaro.....

Mi tute ne posedas Esperanton__ Mi povas iomete Esperanton__

Mi posedas bone Esperanton __ Mi partoprenos la infanan grupon __

Mi estas vegetarano __ Mi estas vegano __

Retpoŝta adreso.....

Adreso

.....

EU-subvencio al EEU

Al la Eŭropa Esperanto-Unio la Eŭropa Komisiono (per la Eŭropa Buroo EACEA: Civitanaj aktivadoj) aprobis la peton 80-procente financi la funkciajn kostojn, oficejon en Bruselo kaj salajron de unu oficisto!

La aprobita sumo estas 55.000

eŭroj por la jaro 2008. Tio estas rezulto de serioza laboro de la nuna estraro kaj la oficistino Maja Tišljär. EEU estas unu el 36 eŭroponivelaj organizaĵoj kiuj ricevis subvencion el inter pli ol 300 kiuj petis tion.

Zlatko Tišljär

Sukcesa simpozio en Ĝenevo

La 24-an de aprilo okazis en la Ĝeneva sidejo de Unuiĝintaj Nacioj simpozio pri lingvaj homaj rajtoj, dediĉita al la 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio kaj la 60-a datreveno de la Universala Deklaraiko de Homaj Rajtoj. Unuafoje simila simpozio okazis 10 jarojn pli frue lige kun la 90-a datreveno de UEA kaj la 50-a de la Deklaracio. Memorigante pri la iama traktado pri Esperanto ĉe Ligo de Nacioj en la sama loko, Palaco de Nacioj, prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta atentigis: “En ĉi tiu loko Francio iam metis sian vetoon kontraŭ Esperanto. Eble Privat nun kontentus pri ni.”

Bondezirojn por la simpozio sendis la ĝenerala direktoro de la Ĝeneva Oficejo de UN, s-ro Sergio A. Ordzonikidze. Li gratulis UEA pro ĝia jubileo kaj menciis interalie: “UEA faras signifan kontribuon al la antaŭenigo de lingvaj rajtoj en la mondo, precipe pere de sia aktivado subtene al la rajto uzi kaj esti edukata en sia propra gepatra lingvo.”

La estro de la Oficejo de UN por ligoj kun NRO-oj, s-ro Ricardo Espinosa, mem ĉeestis kaj salutparolis. Mesaĝon de la prezidanto de CONGO (komunumo de NRO-j en oficialaj rilatoj kun UN), s-ro Liberato Bautista, peris la unua vicprezidanto de CONGO, s-ino Anna Biondi. La antaŭa prezidanto de CONGO, s-ino Renate Bloem,

kunprezidis la matenan sesion. Nome de Svisa Esperanto-Societo salutis ĝia kunprezidanto Didi Weidmann, kiu elstarigis la rolon de la svisa Esperanto-movado kiel akuŝinto de la jubileanta UEA.

En la programo estis pluraj prelegoj de eminentaj specialistoj. D-ino Tove Skutnabb-Kangas (Universitato de Roskilde, Danlando) prelegis pri “Lingvo, edukado kaj (rompo de) homaj rajtoj”. Ŝi aparte emfazis la lingvan rajton de infanoj ricevi edukon en sia gepatra lingvo, kaj kio okazas kiam oni praktike devigas la infanojn de difinita popolo transiri al alia lingvo.

La temo de prof. François Grin (Universitato de Ĝenevo) estis "Interkompreniĝo kiel strategio por lingva justeco". Li pritraktis modelon, pri kiu li nun laboras, por utiligi la interkompreneblecon inter lingvoj de la sama grupo en Eŭropo por malpliigi la traduk-kvanton kaj samtempe garantii al ĉiu servon en lingvo, kiun li/ŝi povas facile kompreni.

Kunlaboranto de Grin, d-ro Michele Gazzola prelegis pri “Instruado en universitatoj: la lingvaj gajnoj kaj malgajnoj pro internaciismo”. Kiel reprezentantoj de indiĝenaj popoloj en Kolombio, Alasko kaj Ĉilio, pri ties situacio parolis respektive John Mateo Lopez, ambasadoro Ronald Barnes kaj Flor Rayen Calfunao Paillalef.

En la simpozio partoprenis ĉ. 70 homoj el 13 landoj. Proksimume duono estis ne-esperantistoj el diversaj NRO-j. Rimarkinda estis la ĉeesto de klaso de gejunuloj el svisa mezlernejo, sub la gvido de sia instruistino Mireille Grosjean.

La simpozia retpaĝaro www.linguistic-rights.org estos plu evoluigata por fariĝi atentopunkto por ĉiuj, kies lingvaj rajtoj estas malobservataj, kaj por ke oni ĝenerale ekkonsciu, ke Esperanto estas rimedo por defendi lingvajn rajtojn. Financan subtenon por la aranĝo UEA ricevis de Svisa Esperanto-Societo kaj Instituto Hodler '68.

[gaz kom de uea 286]

Momentoj el la DEA-jubileo



Corsetti kaj Schrøder vizitis la tombon de f-ino Noll.



Jen Liss-Lotte Talbro kaj Bent Jensenius ludis reĝinan viziton...



Sub la malnova standardo...



...jen pli serioza pianludado...



... kantis profesiaj kantistoj.



...prepare al la satiro "Estis, estas, estos" de DEJO-anoj.